Friedrich Wilhelm Weber,

# Dektritilio, ĉapitro 4, La noktomeza meso

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1 Noktomezo! Sonorilo
sonas, la monaĥoj piaj
devas jam ekstari tie
en malgrandaj ĉambroj siaj.

2 Vi vekiĝu, dormemuloj
de fojnsaka lito, ĉeso
estas nun de l' nokto, iru
en preĝejon al la meso.

3 Ili ĉiuj kune iras
en la kirkon kun gigantaj
pilieroj, ŝtonvolbaĵon
kvazaŭ ŝultre portegantaj;

4 tien, kie murpentraĵoj
brilas en trankvilo, kie
ĉe l' altar' kandeloj flagras,
tie incenditaj pie. -

5 Kanto mia, nun memoru,
ĝuste diru al mi ĉiujn,
kiuj kantis, preĝis tie;
nomu al mi ĉiujn tiujn,

6 ties sorton kaj hejmlandon!
Ilin vidas mi enpaŝi;
kion ĉiu tiam pensis,
devas vi al mi malkaŝi;

7 ĉion, kvankam tio, jeno
povas ŝajni tro maldeca:
bonaj homoj estis ili,
ĉio estis ja homeca. -

8 Jen unue enen paŝis
la abat' kun seriozo,
jam klinita de la jaroj,
forta kaj kun digna pozo;

. . .

Friedrich Wilhelm Weber,

# Dreizehnlinden, Kapitel 4, Die Mette

1 Mitternacht! Durch ferne Schluchten
Klingt das Klosterglöcklein helle:
Fromme Schläfer, schwarze Mönche,
Werdet wach in eurer Zelle;

2 Werdet wach, ihr frommen Schläfer!
Von dem harten Strohsackbette
Ruft des Ordens strenge Regel
In die Kirche zu der Mette;

3 In die Kirche, wo die Pfeiler
Wie gebannte Hünen ragen,
Die das schwere Steingewölbe
Keuchend auf den Schultern tragen;

4 Wo die stillen, weißen Bilder
An den grauen Wänden schimmern,
Wo im Chor die ew'ge Lampe
Und geweihte Kerzen flimmern. -

5 Jetzt, mein Lied, du scheue Jungfrau,
An die Stirne leg den Finger,
Sinne wach: du mußt mir nennen
All die Beter, all die Singer;

6 Heimatland und Los der Männer,
Die da zu den Sitzen traten,
Und was jeder eben dachte,
Mußt du raten und verraten;

7 Alles, ob auch das und dieses
Herb und ungebührlich scheine:
Die du zeigst, sie waren Menschen,
Gute Menschen, wie ich meine. -

8 Erstlich schritt herein der greise
Abt Warin, voll Kraft und Würde,
Stumpf und stark; die Last der Jahre
Beugt' ihn und des Amtes Bürde.

. . .

9 fil' de Saksa duk' kaj Franka
princidin', en juna aĝo
ĉasis lupojn en arbaro,
la Ardena, kun kuraĝo.

10 Ofte li en Hispanujo
tre aŭdacis en batalo;
malrespekti mondon, tempon
lin instruis Roncevalo.

11 Kun Rolando li batalis,
kiun trafis morta sago;
la araboj fine venkis,
fine sinkis la krucflago.

12 Ofte en batal' sin movas
la abat' en sonĝo sia,
kvazaŭ sonus jen la lasta
voko de kompano lia.

13 Sonis tra animo lia
la Rolanda melodio,
kaj mallaŭte li suspiris:
„Vanta, vana estis ĉio!“ -

14 Venis tiam la prioro,
malmultkapharara nure,
bluokula kaj altkreska,
estis saksdevena pure.

15 Fluis barb' de liaj lipoj
mola, longa; kaj traglitis
ties bukloj liajn fingrojn
ofte, kiam li meditis.

16 Kie faras tra rokpordo
sian vojon la Vezero,
jen situis lia korto,
la praava, ce l' rivero.

17 Lerta je parol' kaj lango
lernis vire li diskuti;
sciis akre, tranĉe uzi
ĝin, se devis li disputi.

. . .

9 Ekberts Sohn, des Sachsenherzogs,
Frankenfürst vom Mutterblute,
Unter die Ardennenwölfe
Sprang er früh mit keckem Mute;

10 In der Kämpfer dichte Knäuel
Sprang er kühn in zwanzig Schlachten;
Ronzeval im heißen Spanien
Lehrt' ihn, Zeit und Welt verachten.

11 Ronzeval! Die Heiden tobten,
Flammen sprühte Durindane,
Olifant zerbarst im Dröhnen,
Dennoch sank die Kreuzesfahne.

12 Und der Abt, in manchem Traume
Ächzt' er noch in Kampfeswettern,
Hört' seines jungen Kämpen
letztes Jauchzen, letztes Schmettern.

13 Durch die Heldenseele rauschte
Jetzt des Rolandsliedes Weise
Wild und schmerzlich: „Vanitatum
Vanitas!“ erseufzt' er leise. -

14 Warkward drauf, der Pater Prior,
Echtes Reis vom Stamm der Sachsen,
Lichten Haars mit blauen Augen,
Schulterbreit und hochgewachsen.

15 Von der Lippe weich und üppig
Floß sein Bart in langen Locken,
Oft beim Grübeln durch die Finger
Glitten ihm die goldnen Flocken.

16 Wo der Weser blaue Fluten
Durch das Felsentor sich bahnen
Ihren Weg ins weite Flachland,
Lag der Freihof seiner Ahnen.

17 Wortgewandt und zungenfertig,
Lernt' er aller Männer Rede;
Scharf und schneidig zu gebrauchen
Wußt' er sie in mancher Fehde.

. . .

18 Fluis ja en liaj vejnoj
Spita sango de l' Germanoj,
li kverelis kun la Slavoj,
Keltoj kaj la Romianoj.

19 Sed al bruskaj kontraŭuloj
skribis li en juna aĝo
glave sian opinion
kaj sur brust' kaj sur vizaĝo.

20 Sed li nun plitrankviliĝis;
nur se memorigis iu
jenan tagon de Verdeno,[3]
jenan sangan tagon, kiu

21 estis nigra por la Saksoj,
tiam sentis li koleron;
sed li sciis bridi siajn
sentojn kaj la maltoleron;

22 ĉar li servis virfidele
al la duko, filo Dia,
kiu krucon kaj dornkronon
havas en standardo sia.

23 Estas trista li hodiaŭ;
antaŭvidas li, ke iam
venos la malbon' de tiuj,
kiuj l' krucon portis tiam;

24 ke de l' okcident' minacos
rab', perforto kaj falsigo
de l' germana jur' kaj moron
inundanta romanigo.

25 Levis li profetajn siajn
vidojn supren al l' altaro:
„Gracu al patrujo mia,
ho Sinjoro de l' homaro!“ -

. . .

18 Lust am Kampf im deutschen Herzen,
Deutsches Blut in jeder Ader,
Mit Romanen, Welschen, Wenden
Stritt er oft in hartem Hader.

19 Aber schroffen Widersachern
Schrieb er gern im Jugenddrange
Seiner Meinung rote Runen
Mit dem Schwert auf Brust und Wange.

20 Stiller war sein Mut geworden;
Nur wenn unversehens einer
Jenes Tags bei Verden dachte,
Jenes Bluttags, schwarz wie keiner,

21 Fuhr er auf, die Augen blitzten,
Glüh vom Sachsentrotz, dem alten;
Doch er konnte starken Willens
Seinen Zorn im Zügel halten;

22 Denn er dient' in Mannentreue
Seinem Herzog, Gottes Sohne,
Der da führt das Kreuz im Banner
Und die blut'ge Dornenkrone.

23 Sein Gemüt bewegten heute
Trübe, traurige Gedanken:
Die des Heilands Lehre brachten,
Arges bringen einst die Franken.

24 Denn er sah im Geist: vom Westen
Droht Gewalttat, Raub und Fälschung
Deutschen Rechts und deutscher Sitte
Überflutende Verwelschung.

25 Fern, noch fern! - Zum Hochaltare
Hub er fromm die Seherblicke:
„Herr der Welt, in Gnaden füge
Meines Vaterlands Geschicke!“ -

. . .

[3] Ĉe Verdeno (germane: Verden an der Aller), situanta en la nuna germana provinco Malsupra Saksio, la Franka reĝo Karlo, nomata la Granda, lasis laŭ iu raporto senkapigi proksimume 4.500 Saksajn nobelulojn, kiuj estis ribelintaj kontraŭ lia reĝimo.

26 Iris poste softapaŝe
Heribert', pensulo pala;
staris lia hejmo en la
region' Mozelo-vala.

27 Multajn jarojn en Francio
li atendis, ke akiru
li neekkonitan scion,
ke saĝul' al li ĝin diru.

28 Koni ĉiujn mondajn leĝojn,
tio estis lia celo:
li sin kontentigis je la
studo de Aristotelo.

29 Nun li pensas pri l' problemo,
ĉu virt' aposteriore
venas el instru' kaj sperto
aŭ ĉu sidas ĝi enkore. -

30 Tiam venis Luithardo,
el nobela familio,
falk-okula, en montaro
kreskis tiu ĉi abio.

31 Al ĉasad' kutimiĝinte
en arbar', sur erikejo,
li havigis ĉion por la
monaĥeja kuirejo.

32 Lupojn, vulpojn li insidis,
kiuj estis vera plago;
eĉ la ursojn li atakis
per la arko kaj la sago.

33 „Ĉu sukcesos mi," li pensis,
„morgaŭ urogalon pafi?
Ĉe tagiĝo, dum amludo,
tiam povos mi gin trafi." -

34 Enen paŝis patro Ivo,
kiun ja konvenis plie
porti kaskon kaj kirason
ol monaĥ-cemizon pie.

. . .

26 Heribert, der bleiche Denker,
Folgt' ihm nach mit sachten Schritten;
Wo die Mosel rauscht', da standen
Seines Heimatdorfes Hütten.

27 In der gallischen Corbeja
Saß der Jüngling viele Jahre,
Harrend, daß das Nieerforschte
Weiser Mund ihm offenbare,

28 Die Gesetze, die der großen,
die der kleinen Welt gebieten,
Bis er sich beschränkt' und senkte
In den Geist des Stagiriten.

29 Jetzt erwog er das Problema,
Ob der Tugend milde Flamme
Aus Belehrung und Erfahrung
Oder aus dem Herzen stamme. -

30 Dann erschien der Pater Luthard,
Falkenäugig, hochgeschossen,
Edlen Bluts; im Habichtswalde
War dies Tannenreis ersprossen.

31 Früh gewöhnt an Weidmannswerke,
Trotz der Schul' an Weidmannssprüche,
War's ihm Freud' und Pflicht, zu schaffen
Vorrat in die Klosterküche

32 Und, was unhold trabt im Berge,
Fuchs und Wolf, die schlimmen Plager,
Zu belisten und den Bären
Anzugehn im eignen Lager.

33 Dacht' er jetzt: „Die Knospen schwellen:
Sollt' es morgen nicht gelingen,
Auf der Falz im Tagesdämmern
An den Auerhahn zu springen?" -

34 Nach ihm trat herein der Riese
Pater Ivo. Traun, dem Alten
Stünden besser Helm und Brünne
Als des Chorhemds weiche Falten!

. . .

35 Devis li la patrajn gregojn
gardi en junaĝo sia;
estis disbatita tie
de ŝtelist' vizago lia.

36 Disfendiĝis de orelo
ĝis orelo la cikatro.
„Iru en la monaĥejon!“
diris al li lia patro.

37 Li malantaŭ monaĥejaj
muroj sin instrui lasis,
la latinan ekzamenon
li malbone nur trapasis.

38 Sed komprenis li rapide
de la nombroj la misteron,
kaj al firma konstruaĵo
li kunmetis ĉiun eron.

39 Kiam oni ekkonstruis
tiun monaĥejan domon,
oni vidis gaje iri
tien ĉi ĉi tiun homon.

40 Pensas li nun: „Al sanulo
sendas malsanecon Dio;
Estis mi vundata ege,
kaj saviĝis mi per tio.“ -

41 Venis tiam sesa frato,
de l' Bruktrera tribo ano,
kiuj portas lignajn ŝuojn,
nutras sin per nigra pano,

42 homoj palaj kaj trankvilaj,
kiuj kredas je fantomoj;
nokte ŝvebas tiuj cirkaŭ
marĉoj kaj iliaj domoj.

43 Ĉar li serĉis la trankvilon
for de l' hejma kabanaro,
lin konsolis kaj akceptis
episkopo Hatumaro.

. . .

35 Hüten mußt' er seines Vaters
Herden auf den Emmerauen;
Dort, im Kampf mit einem Roßdieb
Ward ihm sein Gesicht zerhauen,

36 Zwiegeteilt von Ohr zu Ohre;
Rot und blau erquoll die Narbe:
Geh ins Kloster, armer Junge,
Mädchen lieben beßre Farbe!

37 Drauf in Winfrieds heil'gen Mauern
Ließ er gern sich unterrichten:
Zwar Raban, der kluge Meister,
Lobte sein Latein mitnichten;,

38 Doch begriff er schnell der Zahlen
Heimlichkeit; mit Stab und Leine
Maß er und zu festem Baue
Fügt' er schicklich Holz und Steine.

39 Als nun Abt Warin das neue
Klosterhaus begann zu gründen,
Ging im Dienst der Werkerfahrne
Frohen Muts nach Dreizehnlinden.

40 Jetzo dacht' er: „Schwere Krankheit
Schickt der Himmel dem Gesunden
Zur Genesung und dem Kranken
Zur Genesung schwere Wunden.“ -

41 Pater Bernhard war der sechste,
Stammend aus den Bruktrerföhren,
Wo die Menschen Holzschuh tragen
Und von schwarzem Brot sich nähren:

42 Blasse, blonde, stille Menschen,
Träumerische, ahnungsreiche;
Nächtlich flattern Geisterschemen
Durch die Heid' um Moor und Teiche.

43 Von des Vaters Strohdachkotten
Schied der Knab' und suchte Ruhe;
Hathumar, der milde Bischof,
Gab ihm Trost und Lederschuhe.

. . .

44 Gardis lin la frat' Tankmaro,
ke ne trou la fervoro;
eĉ ĉi tie li ne trovis
la trankvilon de la koro.

45 Je la vivo enĉiela
tage, nokte li sopiris:
„Havu la anim' flugilojn!"
ofte plore li suspiris. -

46 Vigle post li paŝis enen
nun la frato Sigevardo.
De l' deklivoj de l' Osningo[4]
venis tiu gaja bardo.

47 Sur dancfestoj aŭ kortegoj,
siajn kantojn jen kantante,
vagis li tra multaj landoj,
violonon jen ludante.

48 Vidis li la delegiton
de Haruno Alraŝido,
- ankaŭ ties elefanton,
por li pli impona vido -,

49 kiam li ĉe l' rega korto
ludis siajn melodiojn,
vidis ankaŭ la unuajn
elmontritajn jen simiojn.

50 Kiam pro venteg' taŭziĝas
de la migrobird' plumaro,
tiam laca gi volonte
sin sidigas en arbaro.

51 Sigevardo, la vagulo,
forfuginta mondajn bruojn,
antaŭ la preĝejan pordon
metis siajn migroŝuojn.

52 Estas tolerebla eble
por la falko la ĉapeto;
kant' nereteneble fluas
el la koro de poeto.

...

44 Tankmar hieß der fromme Priester,
Der dem Eifervollen wehrte;
Auch in stiller Klosterzelle
Fehlt' ihm, was sein Herz begehrte.

45 Nach des Himmels goldnen Häusern
Weint' er jetzt, wie spät und frühe,
Seufzend: „Wer doch Taubenflügel
Der gefangnen Seele liehe!" -

46 Munter schritt ihm nach der kecke
Sigeward. Des Osnings Hänge
Rauschten in die Brust des Knaben
Wilde, wunderliche Sänge.

47 Mit den Sängen, mit der Fiedel
Zog er weit von Gau'n zu Gauen,
Strich zum Tanz den Freilingstöchtern
Und den stolzen Edelfrauen.

48 Sah am Königshof des großen
Harun-al-Raschids Gesandten
An den großen Frankenkönig,
Den noch größern Elefanten;

49 Auch ein Äfflein; dieser Affe
War der erste Aff' im Norden:
Menschheitsväter sind sie später
Und gemein im Land geworden.

50 Saust dem müden Wandervogel
Quer der Sturmwind ins Gefieder,
Gern an menschenferner Stelle
Läßt er sich im Walde nieder.

51 Sigeward, der irre Fahrer,
Flüchtend aus dem Weltgebrause,
Stellt' ans Kirchtor Stab und Schuhe
Und erkor die stille Klause.

52 Islands Falke kann die Kappe,
Ring und Riemen stumm verschmerzen:
Unaufhaltsam bricht des Liedes
Sprudel aus Poetenherzen.

...

[4]„Osningo" (germane: Osning) estas malnova nomo de la Teŭtoburga Arbaro, montaro en norda Germanio.

53 Ankaŭ en la monaĥejo
sonis liaj kantoj belaj;
sed la kantoj pri l' Osningo
hejma estis la plej helaj.

54 Ĵus en lian kapon venis
moka vers' pri Franka rato:
„Kiam ridos la prioro,
ĉagrenigos la abato!“ -

55 Hato venis, altafrunta,
kun rigardoj goj-ebriaj;
venis li de l' land' de l' Rejno
kun vinberplantejoj ĝiaj.

56 Ivo diris pri li ŝerce:
„Nutris lin patrino lia
per vinbera mosto dolĉa,
ne per propra lakto sia!“

57 Frue li dediĉis sin jam
al la servo eklezia;
trovi versojn, melodiojn
estis ŝat-okupo lia.

58 Ankaŭ sciis li bildigi
per koloroj viv-fidelaj
historiojn religiajn,
kaj en bildoj rave belaj.

59 Pentras li enpense, kiel
reekstaris Kristo glore,
falis malamikoj dorsen,
kantis angelar' adore. -

*Traduko de la Germana poemo "Dreizehnlinden, Kapitel 4, Die Mette" de* FRIEDRICH WILHELM WEBER *(Frederiko Vilhelmo Vebero, ∗1813-12-25 – †1894-04.05) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-152-301 (2014-12-20 19:50:20)*

53 Auch im Kloster, deutsch und römisch,
Klangen Sigewards Gesänge,
Doch am hellsten klang der liebe
Heimatlaut der Osnighänge.

54 Jetzo durch den Kopf des Mönches
Flog ein Reimlein auf die Franken:
„O wie wird der Prior lachen,
Und der Abt, wie würd' er zanken!“ -

55 Hatto kam, mit hoher Stirne
Und mit selig trunknen Blicken:
Kind des Landes, wo am Hügel
Rhein und Wein sich freundlich nicken.

56 Ivo sagt' im Scherz, die Mutter
Hab' in einer Rebenlaube
Ihn ernährt mit feurig süßem
Most der Deidesheimer Traube.

57 Früh gewidmet dem Altare,
Trieb es ihn, zu Dreizehnlinden
Heil'ger Hymnen und Sequenzen
Wort und Weise zu erfinden;

58 Auch mit wohlgewählten Farben
In lebendig treuen Bildern
Auf der Leinwand fromme Sage
Und Geschichte abzuschildern.

59 Heute malt' er in Gedanken
Wie sein Held, der Todbesieger,
Glorreich auferstand und rückwärts
Taumelten die welschen Krieger. -

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* FRIEDRICH WILHELM WEBER *(Frederiko Vilhelmo Vebero, ∗1813-12-25 – †1894-04.05).*

*Arg-152-298 (2014-12-20 19:51:49)*